

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 9 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1979

N° 70

FEDERACIA KONGRESO

31-a de marto – 1-a de aprilo 79

La kongreso okazos en la protestanta instituto pri teologio (1, Av. Villedeneuve d'Angoulême, en la suda parto de la urbo).

Tie ni vespermanĝos kaj povos tranokti, sed la nombro de la dormĉambroj estas limigita : 1 dulita, 1 trilita, 7 unupersonaj.

Oni povas mendi hotelon.

PROGRAMO

Sabaton je la 15^a : laborkunsido

19^a : vespermanĝo

20^a 30 : distra vespero-surpriza programo

Dimanĉon je la 9^a : labprkunsido

11^a : INAUGURO de la STRATO Dⁿⁱ ZAMENHOF, kun ofici-
aluloj

12^a : komuna manĝo en restoracio

14^a : vizito de la urbo

Aligu rapide, ĉiukaze antaŭ la 14^a de marto. Dankom!

PREZOJ

Vespermanĝo : 23 F.

En la instituto : dormĉambro 1 persona : 23 F.

2-lita : 30 F.

3-lita : 33 F.

En hotelo bonvolu indiki la prezon aŭ la kategorion.

Pro renkontitaj malfacilaĵoj, la federacia kongreso povos okazi, nek je la antaŭviditaj datoj, nek en MENDE. Ni tamen esperas okazigi en Lozère en ĉu dutagan aŭtunan laborkunsidon, ĉu la venontjaran federacian kongreson. Pri- diskutota afero. Dume la ĉi-jara federacia kongreso okazos en Montpellier la 31-an de marto kaj 1-an de aprilo laŭ la ĉi-aldonita programo. Por la loĝ-kaj manĝmendoj vi bonvolu senpere rilati kun D-ino VIERNE antaŭ la 14-a de marto.

Por demandoj kiujn vi dezirus ke ni pridiskutu en Montpellier vi bonvolu skribi al mi tiel ke mi ilin enskribos en la tagordon.

Reklamu kaj diskonigu nian federacian kongreson kies ĉefa ero por la ekstera publiko estos la inaŭguro de Zamenhof-strato.

Esperanta semajno² en Seto

Kiam, lastan majon, ni partoprenis kun kelkaj kunuloj de la Universitato de la Tria Aĝo la federacian kongreson, vidinte la lokon, ni estis ĉarmitaj.

Ni tuj planis projekton pri renkonto dum kiu ni povus agrable perfektigi nian lernadon en esperanta lingvo kaj fari kelkajn ekskursojn.

La dato de tiu restado estis fiksita de la deka ĝis la deksepa septembro.

Jam dum la unua vespero, ĉirkaŭ apotit-veka tablo, la animstato estis gaja. Ĉiuj ni estis la bona humoro mem.

Ĉiumatene ni senlace kaj kurage laboradis dum du horoj, niaj, ĉiam sindonemaj, profesoroj sparis nek tempon, nek anĝelan paciencon por nin helpi progresi en la studado.

Dum la posttagmezoj la distraĵoj estis multnombraj. Iun tagon ni faris promenadon en boato ĉirkaŭ la lago. Alian fojon ni vizitis la urbeton Balaruko, kie oni kuracadas reŭmatismen per ŝlimo, banado, kaj masaĝo. Ankaŭ ni vizitis la bredadon de Buzigo, kie ostroj kaj mituloj amasiĝas. La amatoroj de ostroj tre kontentiĝis - malbonsance neniu trovis perlon!

Post la vespermanĝoj ni faris diversajn ludojn, kiuj permesis al ni riĉigi nian vorttrezoron.

Ni ĉiuj rememorigas al ni tiun bonan restadon. Necesaj estas diri, ke la organizado estis perfekta, la loĝejo komforta, la nutraĵo bongusta kaj tre abunda. Oni povis forgesi zorgojn aŭ okupojn de la ĉiutaga vivo. Ni ankaŭ estis favorataj de bela vetero.

Finfine, post la komuna peno, post la komunaj plezuroj, mi certas ke ni plibone komprenis nin, ke nia reciproka koniĝado estis pli interesa. La kamaradeco transformiĝis en amikecon. Ni esperas fari denove alian sperton, ne nur kun la gelnantoj de la universitato, sed kun pli vasta rondo da samideanoj.

Lingva Rubriko

En la lasta n^o de S.F.S., ni publikis sub la ĉi-supra titolo jenajn demandojn:

1^e) En la antaŭparolo de la Fundamento, troviĝas tiu propono:

" tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardis ĉiam kiel laĝojn por li "

Nia opinio ne devus esti li, sed si.

kaj ni petis, kiu povas solvi ĉi problemon?

2^e) Ni ankaŭ starigis demandon pri la fundamenta imperativo, kiu en la nuntempaj Esperanto-gramatikistoj anstataŭigas per la nefundamenta modo: volitivo, kaj ni demandis, kiu gramatikisto responsas pri tiu anstataŭigo.

Ni sendis tiun lingvan rubrikon al Gaston Warengnien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj tiu ĉi bonvolis ĝin respondi pere de la ĉi-suba klarigo.

Ni tute kore dankas nian eminentan samideanon pro tiu lia respondo.

1^e) REFLEKSIVO: Oni ofte asertas ke Zamenhof "preskribis regulojn", kiu fakte ne ekzistas. Nenie Zamenhof donis regulojn por la uzado de la refleksivo, sed, el lia uzado kaj el liaj konsultoj, oni povas tiri la konkludon, ke la refleksivo estas, en lia penso, surgato de la personaj pronomoj tria-personaj, uzenda, kiam tiuj ĉi pronomoj estus konfuzodonaĵoj; kiam tia danĝero ne ekzistas, la uzo de la refleksivo ne ŝajnis al li deviga. Tia estas la okazo de la citita frazo. Bonvolu ankaŭ (re)legi la §.96 el liaj "Lingvaj Respondoj" (sesa eldono)



...../.....
2°) IMPERATIVO . Mi opinias (krom obla memor-eraro), ke mi estas la kulpinto pri enkonduko de la termino "volitivo". Per tio mi volis eviti ĉian miskomprenon : la Esperanta konjugacio prezentas koheran sistemon, kiu ne trovas ĝustajn respondojn en la franca, germana aŭ itala konjugacio : tio estas evidenta pri tiu modo de la "volleco" : la unuaj gramatikistoj (Beaufront, Aymonier) uzis la nomon "Impératif-Subjonctif", kiu estis taŭga nek pri la imperativo (en la franca ekzistas nur ĉe tiu modo la dua singulara kaj la unua kaj dua pluralaj personoj, dum en E-o povas esti uzata je ĉiuj personoj), nek pri la subjunktivo (en la franca oni uzas ĝin ofte en subpropozicioj kiuj esprimas dubon kaj ne volon); tiel ke tiuj aŭtoroj devis poste klarigi kaj limigi la okazojn, kiam la uzo de la u-modo estas ĝusta kaj kiam ne. Ĉar la esenca signifo de la u-modo estas la volleco, mi pruntis de la lingvistiko ĉiujn eŭropa la terminon "volitif", "volitivo"; kaj ĝis nun ĝi kontentigis ĉiujn gramatikistojn kaj verkintojn de lernolibroj.

G. Waringhien

La bankoficisto kaj la najtingalo

Iu malaltranga bankoficisto vivis sola en granda domo, en kies teretaĝo loĝis maljuna pordistino.

Tiu bankoficisto ne havis bonajn vivkondiĉojn : li ja ricevis ĉiumonate la plej malaltan salajron de sia tuta banko, kio ĝis nun malpermesis al li ĉiun provon de geedziĝo, sed li krome pasigis tre melankoliajn vesperojn aŭskultante radiosendojn en sia subtegmeta studio.

Nur io lin interesis : la najtingalo de la pordistino. Tiu pordistino posedis ja tre belan najtingalon, kiu en sia kaĝo alkroĉita en la koridoro, kantis tutan tagon, kaj tiu kantado ege plezurigis lin, dum li, okaze de tagmeza paŭzo ascendis sian kvinan etaĝon.

Li estis tiom plezurigita de tiu kantado, ke li iun tagon decidis aĉeti tutsimilan milan najtingalon. Li ĝin trovis sur pariza kajo kaj rapide kaj ĝoje kunportis hejmen.

Sed ho ve, ne kantis lia najtingalo. Li vane provis diversmaniere igi ĝin kanti, sed liaj provoj tute fiaskis.

Tial, iun nokton, li kunprenis ĝian kaĝon, softe descendis la kvinan etaĝon, kaj alveninte en la koridoron, li deprenis la najtingalon kaĝon de la pordistino, alkroĉis la sian al ties hoko, kaj rapide, piedpinte, reascendis la etaĝojn.

Tuj je tagiĝo lia nova najtingalo ekkantis. Kaj de tiam lia hejmo estis daŭre ĝojigita de la birda kantado.

Pro tio la psiko de nia bankoficisto tute ŝanĝiis. Li vidis la ĉiutagan vivon per pere de tute novaj okuloj. Kaj eĉ, tri monatojn post la interŝanĝo de la najtingalaj kaĝoj, li estis eĉ sufiĉe bonŝanca por gajni gravan monsumon ĉe la nacia loterio.

Li tiam estis kaptita de konscienciproĉoj. Tial, iun matenon, li eniris la loĝejon de sia pordistino kaj petis ŝin, ke ŝi vendu al li sian najtingalon. Li povas ĝin pagi altan prezon, aldiris li.

Sed la pordistino tute ne konsentis vendi sian birdon. Li do insistis plialtigis la proponitan prezon, vane. Ŝi tute ne konsentis. Sed kial do, demandis la bankoficisto ?

Mi ne volas ĝin vendi, respondis ŝi, ĉar ĝi tute ne plu volas kanti de kiam, antaŭ tri monatoj, mortis mia dujara nepineto.
dum nokt

Esperantigis : GOSO

PRELEGO pri ESPERANTO en KATALUNA LINGVO

La Kataluna Kultura Centro de Perpignan petis s-ron René LLECH-WALTER, delegito de U.E.A. prelegi en kataluna lingvo pri la problemo de la interkompreniĝo.

Post ludado kaj kantado de "La Espero" per la Gajaj Katalunaj Trobadoroj, Llech-Walter elmontris per okulfrapaj faktoj, ke Esperanto estas la solvo de la homara interkompreniĝo.

La plej grava rezultato de tiu prelego estas la varbado de la Prezidanto de la Kataluna Kultura Centro, s-ro Joseph Deloncle, Direktoro de la Muzeo pri popolaj artoj kaj tradicioj de la urbo Perpignan, 29, Rue de Gascogne, 66000 Perpignan (Francio). Oni povas lin gratuli letere aŭ P.K.

FEDERATION DEPARTEMENTALE

- 4 -

Esperanto de l'Herault

De la 16^a ĝis la 23^a de septembro 1979 ni organizas esperantistan semajnon en Lazaret. Lazaret estas tre agrabla kaj komforta feriejo en parko ĉe la mediteranea maro. Tie oni povas bani, studi, babilu, promeni, ludi... laŭ-plaĉe. sin Matene divers-nivelaj kursoj estas proponataj al laboremuloj.

Posttagmeze ekskursoj, vizitoj.

Vespere ludoj, kantoj, prelegoj...

Prezo : loĝado kaj 3 manĝoj :

en unupersona ĉambro : 570 FF.

en dupersona ĉambro : 500 FF.

Por aliĝo antaŭ la 15a de majo : 600 FF kaj 530 FF ĝis la 1^a de julio.

Ni rezervis nun 40 lokojn.

Aliĝo valoras nur kun garantia sumo de 50 FF.

Groupe Esperantiste de Montpellier : CCP 1.487 - 48 D
Montpellier

VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

RESUMO de nia INFORM-LABORO

1°) Ekspozicio " Le Livre esperanto " okazis la 12-an de novembro en la Pavillon Populaire.

Ĝi pravigis la :

- aperigon de du artikoloj en MIDI-LIBRE, unu por anonci, la alia por raporti
- disdonon de invitiloj ĉe la enirejoj de du prelegoj kun pli ol 100 ĉesstantoj.
- pendigon de 6-metra banderolo "EXPOSITION LE LIVRE ESPERANTO", en la plej uzata bulvarde de la urbo dum 5 tagoj.

2°) Grupo de virinoj petis prelegon pri E-o ligilo inter la popoloj.

Ĝi okazis la 8-an de januaro, fare de F-ino VIERNE. Ĉeestis 20 virinoj.

Informiloj estis disdonataj.

3°) en MJC de CASTELNAU le LEZ, antaŭurbo de Montpellier, okazis la 8-an de februaro prelego pri E-o kun lumbildoj kaj ekspozicio.

4°) ESPERANTO-ACTUALITES : Oni disdonas al interesuloj, oni "forgesas" ilin ĉe revuo-tabloj en atendejoj (kuracistoj, dent-kuracistoj...)

5°) Kartojn U.E.F. Oni donas al interesatoj

INSTRU-LABORO :

Universitato de tria tempo :

1°) 1-a grada kurso gvidata de S-ro DIEZ

2°) 2-a grada kurso gvidata de S-ro LENTAIGNE .


Ĉe Centre International des Jeunes , Rue Petite Coraterie , ĉiujn ĵaŭdojn de la 18^a30 ĝis la 19^a30 , konversacia klubo por perfektigantoj.

MONTPELLIER

Nous rappelons aux isolés de l'Herault qu'ils peuvent adhérer à la Fédération. Dans leur cotisation (8 F) est inclus l'abonnement à "Sudfrancia Stelo". Ainsi ils sont tenus au courant des activités de la région. Ils peuvent de plus adhérer à l'Union Française pour l'Esperanto (U.F.E.) et recevoir l'organe national "Revue Française d'Esperanto (cotisation : 80 F.).

Les 2 cotisations sont reçues au C.C.P. n° 1689.89 E Montpellier = Fédération Départementale Esperanto de l'Herault.

5 minutoj de paŭzo



Restu bone dekstre Petro, jen stultulo kiu volas preterpasi.




SEN VORTOJ




SEN VORTOJ



Mi deziras al ĉiuj : Bonan Jarfinon.



Vi rajtas helpi nenium !



Venu, mi ofertas al vi glason da io...

R. Fuchs

Federacio "Gard"

La Jara kunveno okazis en Nîmes, Centro Pablo Neruda, dimanĉon la 21-an de Januaro.

Raynaud raportis pri la rezulto de la enketo pri la eventuala sinteno de la kandidatoj de nia departemento al la Nacia Asembleo rilate la leĝproponon n° 1667 kaj la enkondukon de Esperanto kiel laborlingvon en la Europa Komunumo. El 21 demandoj ni ricevis 13 respondojn, ĝenerale kontentigajn.

S-ino VOLPELIERE informis nin pri la diversaj kursoj en Nîmo.

Temis poste pri ...propagando kaj varbado. Ni, interalie decidis donaci al pliaj publikaj bibliotekoj la franclingvan verkon de M. ZIOLKOWSKA: "D-ro ESPERANTO" kaj "Nouveau cours rationnel et complet".

Ni antaŭvidos la cblecon organizi ekskurson en Villeneuve-lès-Avignon, fine de majo.

KOTIZO : Ĝi estas sensanĝa : 2 F. kaj la abono al "Sudfrancia Stelo" : 7 F.
Izoluloj bonvolu pagi al Federacio du Gard pour l'ESPERANTO.
P.Ĉ.K. Montpellier 1.857 07 B.

Nîmes Rondo

Tom Bonsanca periodo por la Nîma Rondo.

Somere 5 gelnantoj partoprenis, jen unu, jen tri semajnojn en la Gresijona sezono. El tiuj personoj, S-ino Soulier tiam trapasis sukcese la Ateston pri Praktika Lernado, kaj S-ino Chaudouard la Ateston pri Lernado.

En oktobro kvin el la sep gelnantoj de la unuagrada kurso de la pasinta jaro sukcesis la Ateston pri Lernado kun kvar citoj; Bone, kaj unu cito: Sufiĉe Bone. Temas pri S-inoj Marcelle kaj Thérèse Gimelac, Claire Joubert (17 Jara), Georges Trigan kaj René Guillaume.

Ĉiuj gelnantoj de la antaŭaj kursoj daŭre studas nian lingvon. Kvin gelnantoj enskribi ĝis en la unuajara kurso kaj partoprenas ĝin. Tiu kurso estas gvidata de Roger Volpelière.

Krom la monata kunveno, kelkaj rondanoj kunvenas ĉiumerkrede por trihora studado aŭ konversacio sub la gvido de Georges SALAN, kiu aliflanke trapasis la triunajn ekzamenojn, kun sukceso kompreneble.

S-ino VOLPELIERE, invitita de Ges-roj Joubert, instruistoj de angla lingvo, gepatroj de Claire Joubert, povis prelegi unu horon en tri klasoj de iu kolegio. Nun Claire anoncis, ke ŝi kaj ŝia juna fratino (14 jara) enskribiĝis por partopreni la paskan semajnon en Greziljono.

Fine S-ino Mounier, kiu parolis pri Esperanto al siaj gelnantoj, instruas ĝin al araba, tre diligenta knabino.

Ni esperu, ke tiu favora ĉirkaŭa etose daŭru...!

La originoj de la Sardano



En la n° 68 de "SUDFRANCIA STELO", ni komencis la publikigon de interesa artikolo de nia samideano René LLECH-WALTER pri

"LA ORIGINOJ de la SARDANO"

Pro manko de loko, ni ne sukcesis enmeti la sekvan on de tiu etudo. Ni esprimas nian bedaŭron nevolemankaj petas de nia verkista amiko liajn senkulpiĝojn.

.....La Sardano dum la mezepoko estis tre probable nur religia danco, ofte dancata interne de la preĝejoj mem. Tiu religia karaktero postrestis ĝis niaj tagoj: ankoraŭ oni dancas ĝin en kalkaj lokoj de la hispana Katalunio antaŭ religiaj skulptaĵoj okaze de religiaj festoj.....

Sed baldaŭ ĝi perdis tiun karakteron kaj fariĝis popola amuzilo. Kelkfoje, la religiaj aŭtoritatoj malpermesis danci ĝin ĉu interne de la preĝejoj, ĉu antaŭ la preĝejoj.

..... /

La sardano, tre disvastiĝinta tra la tute Katalunio, komencis malaperi iom post iom, koincide kun la politikaj faktoj kiujn mi menciis. Komence de la pasinta jarcento oni nur danci ĝin en la sudpirenea regiono "l'Empordà".

En Rusiljono ankoraŭ tiam oni praktikis dancon iel similan al la sardano, nomata "contrapas", en kiu parteprenantoj ankaŭ dancis sin tenantaj per la manoj, formante ĉenon, ne rondan, sed malfermitan. Tiu ĉi danco estis rezervita nur al la viroj. Cetere la religiaj aŭtoritatoj dum la antaŭaj jarcentoj tre ofte kondamnis aŭ malpermesis tiujn dancojn en ĉena maniero, en kiuj apude dancis viroj kaj virinoj.

Sed estas ĝuste en Rusiljono kie devis okazi fakto kion oni povas konsideri kiel la elirpunkton de la moderna sardano kaj kiu donis kolosan impulson al la disvastiĝo de tiu danco.

Ni menciis antaŭe, ke en la katalunaj orkestroj, nomataj "cobles", oni ludis tiam la keltan sakfluton. Antaŭ oni ludis tamburetojn, fluton kun sep truoj, nomatan "flabiol" kaj du flutojn de alta tono nomatajn "tibles", ĉar en kataluna lingvo ofte la litero "B" estas fonetike konfuzebila kun "P".

La pioniro de la sardana disvastiĝo estis la komponisto PEP VENTURA. Li studis muzikon en la sudpirenea urbo Figueras, en kies orkestro li ludis. Pli poste li venis al Perpignan, kie fabrikisto de muzikinstrumentoj nomita Torom, laŭ la konsiloj de Ventura, kreis novan instrumenton kiun li nomis "tenora", speco de ligna fluto kun metala finaĵo trumpetforma, kiun oni povas nun konsideri kiel la baza instrumento de la modernaj katalunaj orkestroj.

La muzikisto Ventura komponis serion de famaj sardanoj surbaze de la reformoj kiujn li enkondukis en la instrumentaron de la orkestroj. Lia tuta verkaro renovigis majstre la repertuaron de sardanoj, kaj tiu ĉi danco ekkonis baldaŭ novan oran epokon.

Oni povas konsideri kiel klasikulojn de la nuntempa sardano, krom Ventura, la komponistojn Serra, Garreta kaj precipe Morera. Tiu ĉi lasta estas la aŭtoro de la muziko de pluraj sardanoj mondfamaj, precipe de la "Sankta Dorno" (Katalune "La Santa Espina"), kaj "l'Empordà" (nomo de bela sudpirenea regiono).

La klarigo pri la fulmorapida renaskiĝo de la sardano en la hispana katalunio, cent jarojn antaŭ ol ĝia definitiva triumfo en Rusiljono, estas verŝajne iom malsimpla. Eble oni povas klarigi ĝin se oni ligas tion al la grava socia fenomeno konata tie sub la nomo "La Renaixença", tio estas la kataluna renaskiĝo.

Kio estas tiu renaskiĝo? Ĝi estis verdire la speco de reago kontraŭ la hispana centralismo, kiu forprenis multajn rajtojn kaj privilegiojn kiuj dum jarcentoj apartonis al la kataluna popolo. Vidobla manifestacio de tiu reago, en la lasta duono de la jarcento estis intelekta movado kiu tendencis reliefigi, renaskigi la katalunan kulturon kaj ĉefe la katalunan lingvon. En tiu epoko aperis la geniaj verkistoj Verdaguier, Guimerà kaj Maragall. Genia socia reformisto, Josep Antoni Clavé, sukcesis fondi tra la tuta hispana Katalunio multajn popolajn ĥorojn, nuntempe konatajn sub la nomo "Ĥoroj Clavé", kies membroj plejparte laboristoj, pasigis grandan parton de sia libera tempo studante la muzikspecojn, anstataŭ esti, kiel iliaj alilokaj kolegoj en la trinkejoj.

Ne estas strange, ke dum tiu periodo de renaskiĝo de la kataluna kulturo, la popolo entuziasme adoptis dancon pure katalunan, kiu per sia strukturo mem enhavas en si ideon de solidareco kaj demokrateco, ĉefaj sentoj de tiu renaskiĝa movado.

Ke la sardano iel estis ligita al tiuj sociaj faktoroj, tion pruvas la fakto, ke dum la jaro antaŭ la hispana civila milito, la sardanoj fariĝis en hispana Katalunio kvazaŭ muzikaj simboloj de la aŭtonomisma tendenco, kaj post la fino de la civila milito, dum kelke da tempo estis malpermesite ludi kaj danci sardanojn, precipe tiujn, kiuj ludis pli gravan rolon en tiu socipolitika movado (inter ili "La Sankta Dorno", de Morera, pri kiu mi antaŭe parolis).

René LLECH-WALTER (daŭrigota)

(el prelego farita en la Kastelo "GRESILLON" -Pasko 1978)


Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 1^{er} Trimestre 1979

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes

ESPERANTO *Langue Internationale*



1979



**CONGRÈS
RÉGIONAL
LANGUEDOC - ROUSSILLON**

MONTPELLIER

31 Mars - 1^{er} Avril